# CIVILIZO BAZITA SUR MENSOGOJ

## Pri la kulturo, tradicio kaj logiko de la mensogado en Ruslando

### kiel rimedo por defendi la potencon de la regantoj en la Kremlo, por kaŝi la probleman pasintecon kaj kiel strategio de la homoj por pluekzistado

#### laŭ komparaj ekzemploj de Sovetunio kaj putinisma Ruslando

Mensogo estis unu el la sufiĉe efikaj strategiaj armiloj de la „Malvarma Milito". Centoj da milionoj da naivaj homoj en la tuta mondo kredis la sovetiajn mensogojn, kun fatalaj sekvoj por la homaro. Fakte la vivo, politiko kaj historiografio de Ruslando sistemece baziĝas sur mensogoj, falsoj kaj trompoj – de jarcentoj. La sovetiaj ideologoj kutimis senskrupule trompi ne nur la proprajn civitanojn de la socialisma imperio per plej diversaj dubindaj ideologiaj asertoj. Sed trompitaj estis ankaŭ eksterlandaj vizitantoj kaj fremdaj politikistoj, al kiuj oni arogis rakonti plej krudajn fabelojn aŭ montris belajn fasadojn kaj kulisojn, malantaŭ kiuj kaŝiĝis la pura inverso. En sia strebado ŝajnigi sin moderna kaj eŭropeca, Ruslando kutimis kaŝi la negativajn aspektojn kaj malbelajn flankojn de sia civilizo, kiu estis konsiderata sovaĝa kaj „barbara" kiel la homoj mem, kiuj vivis en tiu lando. Pozitivaj reformoj, kiuj modernigis kaj progresigis tiun civilizon, neniam okazis en Ruslando, ĝis hodiaŭ. Ruslando ĉiam stagnadis en politika reakcio, ekonomia subevoluinteco kaj socia subpremado, en militoj kaj mensogaj pravigoj, kiuj kaŭzis la morton de milionoj da homoj. Nur malgranda tavolo de realecfremdaj elituloj, kiuj ekscese vivis en izolitaj luksaj palacoj kaj krude ignoris la bezonojn de la kompatindaj malriĉegaj amasoj, estis tuŝitaj de la brilo. Post la „oktobra socialisma revolucio" de 1917 – kies pravigo baziĝis sur amaso da propagandaj mensogoj[1] – la „burĝaj" kaj „kapitalismaj" principoj, premisoj kaj valoroj estis neitaj de la komunistoj-bolŝevistoj de la krimula bando de Lenin-Trockij-Stalin kaj inversigitaj per tuta arsenalo de menso-goj al nova vero helpe de dubindaj marksismaj teorioj, kiuj, paradokse, havis sian originon en Okcidento. Por helpi la venkon de tiu nova, „alternativa" vero, laŭ kiuj la homoj en Sovetunio devis vivi dum 74 jaroj kaj en la Orienta Eŭropo almenaŭ dum 43 jaroj, sed ankaŭ en diversaj aliaj landoj kiel Ĉinio, Vjetnamio, Norda Koreio, Kamboĝo, Laoso, Mongolio, Kubo k.a., la komunistoj ne hezitis apliki plej brutalajn metodojn.[2] Sed oni ne forgesu, ke sennombraj homoj vivis komforte sub la kondiĉoj de la komunismo aŭ socialismo. Feliĉe tiu profunde mensoga sistemo, kiu daŭris multe tro longe, finiĝis en orienta Eŭropo en 1989 kaj en Sovetunio en 1991. Kvankam hodiaŭ ŝajne neniu civitano de tiuj landoj plu serioze deziras rehavi la komunisman tempon, tamen en la koncernaj landoj, precipe en imperiismaj medioj de Ruslando, parte ekzistas forta nostalgio pri tiu „brila" epoko, kiam la komunisma tendaro ludis gravan geostrategian rolon en la ŝajne ekvilibrita koncerto de la potencoj en la mondo, precipe en la antagonismaj komunisma kaj kapitalisma blokoj.

---

[1] Tiu „revolucio" estis nenio alia ol ŝtatrenverso kontraŭ la reganta registaro. Ekzemple la asertoj pri „supereco de la socialismo", pri la „laborista paradizo", la „brila estonteco", „feliĉa vivo" ktp. estis puraj propagandaj mensogoj. Por pravigi la propran ideologion kaj politikon la bolŝevistoj devis disvastigi diversajn mensogojn pri la carisma, kapitalisma kaj okcidenta sistemoj, kiujn ili kontraŭbatalis kaj celis anstataŭi per propraj paradigmoj, kiuj estis enkondukitaj perforte kaj finfine ne funkciis kaj kondukis al „totalisma" diktaturo.

[2] Oni taksas, ke ĉ. 100 milionoj da homoj fariĝis (mort)viktimoj de la komunismo en la landoj, en kiujn ĝi estis enkondukita, precipe en Sovetunio kaj Ĉinio.

En kelkaj rilatoj, la „totalisma“ mensogo postvivis Sovetunion. Precipe en la putinisma Ruslando la mensogado, trompado kaj falsado de la „vero“ atingis novan kulminan nivelon. La tuta potenco de Putin baziĝas sur grandstilaj mensogoj, dum Putin mem por natingi siajn celojn estas la plej elstara mensoganto kaj trompisto de la pli nova tempo. Ŝajnas, ke la mensogo estas do neelsarkebla integra parto de la rusaj ekzistado, kulturo, tradicio kaj logiko, kiel ankoraŭ montros amaso da ekzemploj. Eble la kulturo de la mensogado kiel bazo de la tiel forte ankrita ambigueco de la „rusa animo“ estas ĉefa kaŭzo de tiom da malbono kaj teruro en la historio de Ruslando, kun fatalaj sekvoj por la propraj civitanoj, ĝiaj najbaroj kaj la tuta homaro.

La unua fifama mensogo de la putinisma erao estas ligita kun mistera incidento okazinta en septembro 1999, kiam en la kelo de iu granda Rjazana loĝdomo en la Novoselov-strato civiluloj hazarde malkovris tri suspektindajn sakojn, sur kiuj estis skribite „sukero“, kvankam en ili plej verŝajne troviĝis la eksplodaĵo heksogeno. Unu el la sakoj ankaŭ enhavis elektronikan horloĝon faritan en formo de poŝtelefono kaj tri bateriojn ligitajn per dratoj por eksplodigi la sakojn en fiksita horo frumatene. La incidento okazis en la sama periodo, kiam en Moskvo kaj aliaj urboj de Ruslando okazis serio da tiaj incidentoj, dum kiuj eksplodis kaj ruiniĝis similaj loĝdomoj, kio kaŭzis centojn da mortviktimoj. Oficialaj esplorantoj de la afero venis al la konkludo, ke la operacoj, ankaŭ tiu en Rjazano, estis plej verŝajne aranĝitaj de la sekreta servo FSB por helpi al Putin venki en la baldaŭaj balotoj por elektigi lin nova ŝtat-estro, dum oni kulpigis ĉeĉenojn pri tiuj „terorismaj atakoj“. Unu el la plej proksimaj protagonistoj de Putin, Nikolaj Patruŝev, kiu tiam ĵus fariĝis nova direktoro de FSB, kiun antaŭ li gvidis Putin mem, asertis, ke temis pri ekzerco. Krom la legendo (fakte mensogo) pri la sukero, kiu laŭdire troviĝis en la menciitaj sakoj, ankaŭ tio plej verŝajne estis mensogo, ĉar en Rjazano neniu de la urbaj oficialuloj aŭ loĝantoj de la eksplodigota loĝdomo mem estis informita pri tia ekzerco por testi la singardemon de la homoj. Sed anstataŭ ĉeĉenoj oni vidis iujn rusaspektajn homojn, kiuj portis la sakojn de la aŭtomobilo tra la dompordo al la kelo (nature tio ne ekskludas la eblon, ke ĉeĉenoj povis esti la fonaj organizantoj, kvankam ekzistas multaj duboj pri tia versio). Ĝis hodiaŭ multaj rusoj kredas, ke FSB lanĉis tiujn domeksplodojn, kvankam pruvoj ne povis esti prezentitaj, ĉar la tuta afero forviŝiĝis en la nebulo de la konfuzo – kaj mensogado.

* * *

Kio do fakte estas mensogo ? Mensogo estas aserto, kiun la sendinto (mensoganto) faras intence, konscio (aŭ nekonscie, rutinece) kun la celo, ke la subjektiva malvera eldiraĵo estas aŭ estu kredita de la ricevanto, ĉu amiko aŭ malamiko, por ke tiu konservu falsan impreson.

Mensogo do estas uzata por akiri avantaĝon, ekzemple por kaŝi eraron aŭ malpermesitan agon por eviti kritikon aŭ punon. Mensogo ankaŭ povas esti farita pro ĝentileco, honto, timo, malcerteco aŭ bezono malsukcesigi la planojn de alia persono aŭ kontraŭulo aŭ por protekti sin mem, aliajn homojn aŭ interesojn de grupo ofte kun la celo krei malharmonion, semi malkonkordon, intrigon aŭ malpacon ĝis milito.

Mensogo ankaŭ povas esti farita pro patriotismaj motivoj. Lomonosov verŝajne tordis la veron, kiam li asertis, ke la Kieva Ŝtato estis fondita de slavoj anstataŭ de normandoj.

Plej konata mensogo en la rusa historio estas la legendo pri la tiel nomataj *Potjomkinaj vilaĝoj*, kiuj estis laŭdiraj „ŝajn-vilaĝoj”, kiujn la ministro kaj feldmarŝalo Grigorij Aleksandroviĉ Potjomkin[3] ordonis konstrui antaŭ la vizito de la rusa carino Katerino la 2a (en 1787) sur la bordo de la rivero Dnjepro, por trompi ŝin. Onidire, Potjomkin, kiu gvidis militiron al Krimeo, survoje starigis fasadojn de vilaĝaj domoj, por ke la carino admiru ilin kaj kredu, ke

[3] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Grigorij_Potjomkin.

en la nove konkerita teritorio de suda Rusujo (fakte Ukrainio) regas prospero kaj riĉeco, kvankam substanco mankas.

Laŭ la opinio de modernaj historiistoj, ĉi tiu historio de la Potjomkinaj „ŝajn-vilaĝoj" tamen estis plej verŝajne mem mensogo, elpensita surbaze de fiklaĉo de ĵaluzaj politikaj malamikoj de Potjomkin, kiu fakte fondis verajn urbecajn strukturojn kaj konstruigis fortikaĵojn, kiuj impresis la carinon, kiam ŝi ekvidis ilin. La esprimo „Potjomkina(j) vilaĝo(j)" obstine konserviĝis en la memorkulturo kaj retoriko de la samtempanoj por misfamigi kaj primoki la trompemajn kaj mensogemajn rusojn kaj disvastiĝis kiel sinonimo kaj rimedo de la kaŝado de malagrablaj aŭ ŝajnigo de malveraj faktoj, kiel simbolo de la iluzio de la nepruvebla sukceso per falsaj rezultoj. Sed Potjomkinaj vilaĝoj do fakte ne ekzistis. Kiel rezulton aŭ esencon de Potjomkinaj vilaĝoj oni hodiaŭ tamen daŭre konsideras la situacion, kiam oni haste kaj supraĵe renovigas la fasadojn de iuj malnovaj domoj okaze de iu festo aŭ speciala evento, kiu estas vizitita de la ŝtatestro aŭ de altranga funkciulo, kiu devas memori la lokon kiel belan scenejon. Sendube tio okazas ne nur en Ruslando. Verdire ankaŭ Sankt Peterburgo, la nova eŭropeca ĉefurbo de la Rusa Imperio, fondita kaj konstruita de caro Petro la Granda, estis speco de grandega Potjomkina vilaĝo, starigita sur marĉa grundo fare de dekmiloj da devigitaj servutuloj, kiuj grandparte pereis dum la laboro. En la provinco ekster la ĉefurbo regis la sama mizero kiel antaŭe.

La starigo de Potjomkinaj vilaĝoj, kiun politikistoj kaj propagandistoj en subevoluintaj landoj tiel ŝatas, neniam kondukos al la starigo de realaj vilaĝoj, sed verŝajne nur al la disvastiĝo de iluzia deziro kaj perfektiĝo en la diversaj artoj mensogi kaj trompi, skribis Hannah Arendt (1906-75) en sia klasika artikolo pri la vero kaj mensogo en la politiko.[4]

Nature, ne nur rusoj mensogis kaj mensogas. Ankaŭ germanoj (Hitler, Goebbels, Ulbricht, Honecker), usonanoj (Nixon, Powell, Trump), ĉinoj (Mao, Xi) kaj probable ĉiuj ceteraj mensogis kaj mensogas en tiu aŭ alia maniero kaj grado (min interesas nur la gravaj kaj famaj mensogoj en la politiko kaj historio). En la kazo de Ruslando tamen temas pri io alia, pri fenomeno aparta, specifa: temas pri la sistema mensogo, la mensoga sistemo en si mem, kiu prosperis cetere sendepende de la konkreta politika sistemo, sed precipe en la tempo de Lenin ĝis Putin, do de 1917-2022, kiam la sistema mensogo kaj la mensoga sistemo plej prosperis en Ruslando (ĉar tie la komunisma mentaleco ne aŭtomate malaperis per la likvido de Sovetunio), kio estas unikaĵo en la historio de la homaro.

* * *

Miĥail Pavloviĉ Ŝiŝkin, rusa verkisto vivanta en Svislando,[5] dediĉis sin al ĉi tiu temo en sia leginda kontribuaĵo „la paradokso de la mensogo" en la libro „Paco aŭ milito", germanlingve aperinta en 2021.[6] Kiam li adoleskis en Rusio (Moskvo), kie li naskiĝis en 1961, lin fascinis nocioj kiel parlamenta respubliko, konstitucio, balotoj, kiuj havis fabelan sonon. Tiuj vortoj fakte jam aperis en la Stalina Konstitucio de 1936, kiu estis propagandata kiel „la plej demokratia konstitucio de la mondo". Temis pri *propaganda mensogo*. Sed la homoj estis naivaj kaj forgesis, ke ĉiuj tiuj vortoj, kiuj estis importitaj el Okcidento, en Sovetunio jam delonge perdis sian originan signifon. En tiu stalina konstitucio estis garantiataj plej diversaj rajtoj: ĝenerala egala kaj rekta balotrajto en sekreta baloto, liberecoj de la parolo, gazetaro kaj kunvenado, libereco okazigi surstratajn manifestaciojn, sekureco de la persono. Neniu povas esti arestita sen decido de la juĝejo aŭ sen konsento de la prokuroro. La sekureco de la loĝejo de la civitano kaj la letera sekreto estas garantiataj…

La aŭtoro de ĉi tiu teksto estis Nikolaj Buĥarin. Tri monatojn post la adopto de tiu konstituacio, en marto 1937, li estis arestita, poste likvidita. La praktiko montris, ke tiu stalina

[4] Vd. http://gellhardt.de/arendt_bluecher/12_Wahrheit_u_Politik.pdf, p. 25/361
[5] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Michail_Pawlowitsch_Schischkin.
[6] Vd. Fritz Pleitgen, Michail Schischkin: Frieden oder Krieg. Russland und der Westen. Eine Annäherung. Heyne 2021.

konstitucio konsistis nur el mensogoj kaj ke ĝiaj vortoj havis alian, malan signifon. Do, libereco signifis praktike malliberecon, rajto malpermeson ktp.

Diversaj nocioj havas diversajn signifojn aŭ semantikon: Dum nocioj kiel „privata posedaĵo“ aŭ „merkata ekonomio“ sonas en okcidentaj oreloj pozitive kaj alloge, en Ruslando ili vekas skeptikon, malfidon, naŭzon, rifuzemon. En Ruslando ekzistas nek perleĝe sekurigita privata posedaĵo nek vera merkata ekonomio en okcidenta senco. Alia ekzemplo estas la nocio „ŝtato“. Dum en „civilizitaj“ (aŭ modernaj) landoj ŝtato signifas instrumenton por defendi la interesojn de ĝia civitanaro, en Ruslando ĝi havas tute alian signifon. Tie ŝtato signifas potencon kaj teritorion, kiuj estas kvazaŭ sanktaj kaj netuŝeblaj. En Okcidento la civitano estas kunposedanto de la ŝtato, en Ruslando li/ŝi estas ĝia subulo, regato. En la postkomunisma Ruslando vortoj kiel demokratio, parlamento, konstitucio fariĝis plumpaj sloganoj kaj batbastonoj de la senfina batalo por potenco kaj mono. Do, en Ruslando ĉiuj tiuj belaj vortoj signifas nur fasadon, malantaŭ kiuj kaŝiĝas nura malpleneco. La rusa ŝtato povas proklami leĝojn, konstituciojn, homajn rajtojn kaj plej diversajn liberecojn – sed Ruslando tamen vivas nur laŭ unusola principo: la arbitre manipulebla kaj aplikebla leĝo de la nelimigita potenco de la Kremlo, kiu ne povas esti kontrolata de la popolo aŭ civilsocio. Pro tio la regantoj kaj multaj enloĝantoj de Ruslando ne komprenis, kial en Okcidento oni kritikis la militojn kontraŭ Ĉeĉenio, pri kiu oni kompreneble konstruis plej diversajn mensogojn por pravigi ilin. La Kremlo decidas ĉion mem en la interesoj de Ruslando!

Dum demokratio signifas por eŭropanoj garantion por personaj liberecoj, por rusoj ĝi estas simbolo de la ĝeneralaj kaoso kaj degenero en la 1990aj jaroj. Kiam Boris Jelcin regis la landon, li fariĝis la plej malŝatata rusa politikisto (kune kun ĉiuj liberalistoj kaj reformistoj), dum en Okcidento li estis adorata kiel pura „demokrato“ (cetere same kiel antaŭ li Gorbaĉov). Ankaŭ tio estis mensogo, aŭ almenaŭ trompo, kiun la okcidentanoj kredis (la diablo scias kion ili kredis[7]). Jelcin utiligis la novajn liberecojn por manipuli la politikon laŭ propra gusto kaj antaŭ ĉio por eviti ajnan konkurencon ĉefe komunisman, kiu minacis lian potencon, pri kiu li fine perdis la kontrolon. Tiel ankaŭ li fariĝis tipe rusa aŭtokrato. Lia elekto de Putin baziĝis sur la falsa kredo, ke tiu iama KGB-ulo estas demokrato, reformisto, kontraŭ-komunisto, kiu gvidos Ruslandon en la helan estontecon. Se oni legas la librojn de diversaj aŭtoroj, ekzemple la aŭtobiografion de Jelcin kaj la libron de Alexander Rahr pri Putin (kiuj aperis en la sama jaro, en 2000), oni povas sekvi la diferencojn de la prezentoj kaj mem decidi, al kiuj interpretoj oni pli kredu.

Alia ekzemplo de miskompreno: En Ruslando multaj homoj konsideris la pereon de Sovetunio kiel „plej gravan geostrategian katastrofon“ (Putin), kiu havis gravajn homajn kaj sociajn sekvojn. En Okcidento tiu historia evento vekis senliman eŭforion kaj senton de triumfo pri la pereinta „imperio de la malbono“; oni opiniis, ke la libereco kaj demokratio venkis en Ruslando. Dum en certaj okcidentaj landoj tiuj vortoj estas integraj kaj neforpenseblaj pilieroj de la ŝtata kaj socia konstruo, en Ruslando ili restis malplenaj propagandaj sloganoj, kiuj havis neniun (pozitivan) efikon. Do, ne estas mirinde, ke en la tempo de Putin tiuj vortoj estis misuzataj por kontraŭ-okcidenta propagando, kiu kondukis al la neado, primokado kaj kontraŭ-batalado de okcidentaj valoroj, kiuj en Ruslando estis pli kaj pli misfamigitaj (kiel simboloj de la laŭdira civiliza dekadenco de la Okcidento) kaj servis kiel rimedoj por disvastigi la plej senskrupulajn, absurdajn kaj cinikajn mensogojn, por krei iun dubindan anticivilizon („rusa mondo“). Plej malfrue en 2022, kiam Ruslando lanĉis la agresmiliton kontraŭ Ukrainio, la homaro konvinkiĝis, ke Ruslando tute ne rezignis militi kontraŭ aliaj landoj kaj elpensitaj malamikoj, ĉar militoj signifas taŭgan strategion por konservi la popularecon de Putin kaj la potencon de lia reĝimo.[8]

---

[7] Mi celas diri Clinton, Kohl, Chirac, la japanoj, la papo k.a. Necesus legi iliajn memuarojn.)

[8] Interesaj estas la enket-rezultoj kaj konkludoj de la Levada-centro, kiuj montras i.a. ke la populareco de Putin falas de tempo al tempo, kiam la aferoj stagnas en Ruslando. Ĉiam kiam lia populareco falas, Putin elpensas ion por fari, ke lia

Ruslando – tio signifas propagandon, mensogon kaj trompadon. Sed jam kiam en Sovetunio okazis diversaj katastrogoj, la aŭtoritatoj klopodis kaŝi kaj bagateligi la verajn okazaĵojn. La plej fama ekzemplo de tiu speco eble estis la kruda publika misinformado pri la eksplodo de la nuklea centralo en Ĉernobilo (Ukrainio) en aprilo 1986, kiu nuklee poluis partojn de Eŭropo.

Kiam en aŭgusto-septembro 1999 (Putin estis ĉefministro) okazis misteraj eksplodigaj atencoj kontraŭ diversaj loĝblokoj en Moskvo, Bujnaksk kaj Volgodonsk, kiuj kaŭzis kelkcent mortviktimojn kaj vunditojn, kaj la provo fari la samon en Rjazan, la rusia registaro kulpigis ĉeĉenajn batalantojn pri la krimoj. En 2002 Dumao-deputito Sergej Kovaljov iniciatis publikan komisionon por esplori la fonon de la nomitaj bombatakoj, kiu venis al la konkludo, ke ne ĉeĉenaj teroristoj sed la FSB (rusia interna sekurecservo) troviĝis malantaŭ la atakoj. Same laŭ esploro de la francaj ĵurnalistoj Jean-Charles Deniau kaj Charles Gazelle la eksplodoj estis aranĝitaj de la FSB por liveri pravigon por daŭrigi la ĉeĉenan militon, kiu siavice devis helpi al Putin venki la komunistojn en la prezident-elekto de la 26a de marto 2000.

La rusoj krude mensogis kaj erarigis la ruslandan kaj internacian publikecon en aŭgusto 2000, kiam ili insiste asertis, ke ilia subakva atomŝipo „K-141 Kursk" estis ramita fare de submarŝipo de NATO, kvankam evidentiĝis, ke en la rusa ŝipo okazis eksplodo pro difektita ekzerctorpedo.

La rusaj aŭtoritatoj ankaŭ krude mensogis okaze de la tragika evento en la teatro Dubrovka en Moskvo en oktobro 2002, kiam ili diskonigis la aserton, ke la (125) ostaĝoj pereis pro pafado kaj eksplodigo de grenadoj flanke de la ĉeĉenaj teroristoj anstataŭ pro la venena gaso, kiu estis enlasita de rusaj fortoj en la salonon. La fakto estis, ke la teroristoj (kiuj antaŭe sukcesis mortigi 5 ostaĝojn) jam estis likviditaj de la specialaj trupoj, kiuj sturmis la teatron, kaj do ne plu povis mortpafi la ostaĝojn, kiuj endormiĝis kaj sufokiĝis pro la cirkulanta gaso. La samaj aŭtoritatoj ankaŭ neniam publikigis raporton pri la esplorado de la cirkonstancoj de la tragedio, ili neniam raportis pri la konsisteco de la gaso kaj evitis senkulpigi sin de la kulpo pri tio, kio okazis, por kaŝi la verajn aferojn antaŭ la publiko.

Ankaŭ la oficiala raporto de la rusia registaro pri la terorisma atako kontraŭ iu lernejo en Beslan, Norda Osetio, en septembro 2004, ne kongruis kun la observoj kaj rakontoj de diversaj surlokaj atestantoj. Ŝajnas, ke ankaŭ en ĉi tiu kazo la rusia registaro celis kaŝi kaj manipuli la faktojn per kruda ignorado kaj falsa prezentado de la veraj okazaĵoj, inkluzive la nombron de la mortviktimoj.

*** * ***

Ankaŭ la cirkonstancoj (kaj antaŭhistorio) de la anekso de Krimeo en februaro/marto 2014 baziĝas sur krudaj mensogoj. Kontraŭe al la asertoj de Putin, la anekso de Krimeo, kiu en Ruslanda estas nomata „reveno de Krimeo", kaj la posta militagreso en Donbaso, estis planata de la Kremlo jam antaŭ la t.n. ŝtatrenverso (puĉo) fare de „ukrainaj faŝistoj" en Kievo, kaj ŝajnas, ke la Kremlo mem preparis tian renverson aŭ puĉon. La pruvo por tiu supozo aŭ aserto estas medalo kun la subskribo „reveno de Krimeo", kiu estis lanĉita kaj produktita en Ruslando longe antaŭ la kieva „puĉo". La puĉo de Putin kontraŭ la ukraina reĝimo devintus okazi la 20an de februaro, sed ĝi fiaskis. En tiu tago okazis la fama masakro de Berkut-trupoj kontraŭ partoprenantoj de la Majdano, kiam mortis pli ol 60 homoj. Du specialaj aviadiloj kun blindigaj fumgrenatoj flugis de Moskvo al Kievo. En la akompanaj deklardokumentoj estis skribite: „Humanitara helpo" – alia kruda mensogo. Kiam prezidento Janukoviĉ provis en Donecko forlasi la landon, li estis eksigita de la ukraina parlamento, kaj tiam li fuĝis al Rus-

popularеco rekresku. Plej bona rimedo estas milito kontraŭ iu ajn kiel tio okazis en Ĉeĉenio 1999, Kartvelio 2008, Ukrainio/Krimeo 2014 kaj Ukrainio 2022. (vd. www.levada.ru)

lando.[9] Por forviŝi la verajn intencojn kaj okazaĵojn, kiuj okazis malantaŭ la kulisoj, la Kremlo simple inversigis la faktojn kaj kulpigis Kievon pri la puĉo. La kutime aplikata principo estas: mensogi, mensogi, mensogi (ĝis kiam la kontraŭa flanko kredas la mensogojn – kaj iuj naivuloj certe kredas ilin). Tio estas tipa agmaniero de la KGB, ĉe kiu Putin lernis sian malpuran fimetion de la grandstilaj mensogado, trompado kaj kaŝado kaj sistemeca kulpigo de la alia flanko.

Kiam Putin aneksis Krimeon en marto 2014, li sendis rusajn soldatojn, kaŝitajn kiel „verdajn viretojn" sen armeaj markoj al la duoninsulo kaj permesis al si la krudan mensogon, ke tiuj soldatoj ne estas rusaj. Kiam la skandalo fariĝis evidenta, li devis konfesi la veron. Cetere la rusa popolo tute ne konsideris ĝin mensogo, sed nur ruza taktiko por trompi la malamikon, kio ne estas peko, sed virto, kiel ili opiniis. Kompreneble, el rusa vidpunkto ne temis pri anekso de Krimeo, sed pri ĝia aligo al la Rusa Federacio post laŭorde okazigita referenduma procezo laŭ la internacia juro. Ankaŭ ĉi tiu ekzemplo ilustras, ke ĉiun ajn validan principon de la internacia juro oni povas transformi en ĝian inverson, ke ĉiun ajn malbonon oni povas deklari kiel bonon.[10]

La rusoj ankaŭ krude mensogis, kiam ili neis la aserton, ke oni elĉiele pafis la malajzian civilan aviadilon de la flugo 17, kiu troviĝis la 17an de julio 2014 survoje super la Donbaso, per Buk-raketo probable lanĉita de por-rusaj sendependistoj. Post la katastrofo tiu Buk-raketa instalaĵo estis rapide retirita sur rusan teritorion. Se Putin asertis, ke la rusa armeo ne batalas en la Donbaso, ĉiuj scias, ke li diris la malveron, ĉar ankaŭ tie la sendependistoj estis subtenataj de soldatoj de la rusa armeo. La familioj de la viktimoj, kiuj pereis en tiu milito, kondutas kvazaŭ ili kredus la version de la rusa registaro kaj silentas. Se Putin mensogas en la propra lando, ĉiuj ruslandanoj scias, ke li mensogas, sed ili tamen reelektas lin kvazaŭ ili konsentus pri liaj mensogoj. Strange. Sed tio jam ekzistis kaj okazis en Sovetunio – do ĝi estas nenio nova, en la postkomunisma Ruslando la sovetia spirito ankoraŭ ne mortis. Ekzemple oni mensogis, kiam la novaĵagentejo TASS siatempe deklaris, ke sovetiaj soldatoj (kaŝitaj kiel „militaj konsilistoj") ne troviĝas en Koreio aŭ Egiptio aŭ Alĝerio aŭ Jemeno aŭ Sirio aŭ Angolo aŭ Mosambiko aŭ Etiopio aŭ Kamboĝo aŭ Bangladeŝo aŭ Laoso aŭ Kubo. Se la sovetiaj soldatoj, kiuj deĵoris en tiuj landoj, ne mortis kaj revenis hejmen, oni ordonis al ili silenti pri sia armea servo en eksterlando. Nur en la 1990aj jaroj ili estis agnoskitaj de Rusio kiel militaj veteranoj. Do, iam okazos, ke tiuj rusaj soldatoj, kiuj batalis en Ukrainio, estos agnoskitaj kiel militaj veteranoj batalintaj en landoj, kies nomoj staros sur la listo, sur kiu estos menciita ankaŭ Ukrainio.

Hitlero skribis ie en „Mia batalo", ke granda mensogo estas pli utila al politikisto ol malgranda, ĉar politikistoj ĉiukaze ĉiam mensogas kaj la homoj scias, ke ili ĉiam mensogas kaj tial ne kredas politikistojn, kiam ili ree elpuŝas unu el siaj etaj mensogoj. Sed se politikisto diras grandan mensogon de tempo al tempo, la homoj povas kredi ĝin, ĉar ili pensas, ke ĝi estas malsama ĉi-foje.

Putin kaj liaj propagandistoj perfektigis ĉi tiun logikon. Ili senĉese rakontas grandajn mensogojn, kiujn ili ornamas per aliaj grandaj mensogoj, kiel: „En Ukrainio ne okazas

---

[9] La 19an de februaro Janukoviĉ komencis kolekti valoraĵojn en sia rezidejo por prepari sian fuĝon, la 20an de februaro devis okazi la puĉo kaj okazis la menciita masakro. La 21an Janukoviĉ subskribis interkonsenton kun la opozicio kaj eŭropaj diplomatoj por fini la politikan krizon, kio signifas ke li restis prezidento. La 22an, kiam li estis ekfuĝonta al Ruslando, li estis eksigita de la ukraina parlamento, kaj li forlasis Ukrainion. Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Geschichte_der_Ukraine#Präsidentschaft_Janukowytsch_und_die_„Revolution_der_Würde", https://www.nzz.ch/feuilleton/sergei-gerasimow-kriegstagebuch-aus-charkiw-teil-4222-ld.1744013?mktcid=nled&mktcval=174&kid=nl174_2023-7-7&ga=1.

[10] La referendumo kaj la sekva anekso ne estis akceptitaj de la plimulto de la UN-ŝtataro, kiu opiniis, ke la juraj kondiĉoj por la procezo de la aligo de Krimeo al RF ne estis plenumitaj. Moskvo tamen konsideras Krimeon kiel propran teritorion. Fakte temis pri perforta rabado de fremda teritorio surbaze de ŝajn-referendumo. En tio la demando, ĉu Krimeo iam apartenis al la Rusa Imperio aŭ al Sovetunio, ludas neniun rolon. En 1954 Krimeo fariĝis parto de la Ukraina SSR. En 1991 la ukrainoj decidis sian ŝtatan suverenecon – Krimeo restis integra parto de la sendependa Ukrainio.

milito", „Ni neniam atakis Ukrainion", „Ukrainoj bombadas sin mem", „Niaj soldatoj en Ukrainio defendas sian propran landon" ktp. Estas malfacile kredi, sed ili vere pretendas tiajn aferojn.[11] La sistemeca senskrupula mensogado de la rusoj ilustriĝas ankaŭ laŭ jena modelo: Kiam la rusoj pafas raketojn kontraŭ civilaj celoj en Ukrainio, kio kaŭzas multajn mortintojn kaj vunditojn, ili asertas unue, ke ili ne respondecis pri la atako, sed la ukraina armeo. Poste ili ŝanĝas sian klarigon kaj diras, ke la koncerna detruita loko estis senintence trafita. Pli malfrue ili korektas tiun aserton por diri, ke la atako kontraŭ tiu celo estis pravigebla, ĉar tie troviĝis malamika armea komandejo situinta sur la dua etaĝo de la konstruaĵo. Inspektado de la loko rezultigas, ke tie ekzistis neniu dua etaĝo, nek armea komandejo.[12]

Certe, ankaŭ okcidentaj politikistoj mensogas, sed laŭ alia algoritmo ol la rusaj. Por esti reelektita en baloto la okcidenta politikisto prefere diras, kion li vere kredas por gajni la konfidon de la elektantoj. La bazo de civilizita socio estas la konfido, inter alie je la ŝtataj instancoj. La dirita vorto devas esti serioze konsiderata kaj estu deviga. En demokratia ordo la malkaŝado de mensogo povas kosti la karieron de politikisto. En alia kazo la usonanoj mensogis pri la laŭdiraj amasdetruaj armiloj de Saddam Hussein, kiuj ŝajne tamen ne ekzistis, por povi lanĉi la militon kontraŭ Irako, ĉar ili celis forigi la malbonon (kiel en nazia Germanio, poste Koreio, Vjetnamio, Kubo, kie troviĝis komunistoj,  ktp.). Tiaj mensogoj povas esti imitataj de aliaj politikistoj ĉefe en landoj kun diktaturo, de krimuloj kaj kanajloj kiel ŝtatestroj por efektivigi proprajn interesojn. En Okcidento la politikistoj ne havas la saman sperton kun senskrupulaj cinikaj mensogoj kiel en Ruslando. Putin perfekte scias tion. La okcidentaj politikistoj komprenas, ke Putin mensogas, sed ili silentas (nu, lastatempe ili menciis ĝin pli ofte, sed en la diplomatio oni malvolonte kritikas ŝtatestrojn). La mensogo kaj trompo estas la ĉefaj armiloj de KGB-oficiro, tion oni ne forgesu. Dum la regado de Putin Ruslando fariĝis terorisma policia ŝtato, kiu ne nur atakas najbarajn landojn, sed grandskale subpremas kaj persekutas ankaŭ la propran popolon per absurdigita apliko de la juro, kio utilas sole al la konservado de la potenco de la Putin-bando. La perona karaktero de tiu homo ne taŭgas kiel ŝtatestro, kiu devus fari ion pozitivan por sia popolo. Militi kontraŭ aliaj landoj kun la celo detrui ilian ŝtatecon kaj konkeri ilian teritorion, mortigi „perfidulojn" kaj enprizonigi politikajn opoziciulojn estas nenio pozitiva, kiel oni kredas almenaŭ en la demokratiaj landoj de Okcidento, kie la populareco de Putin estas perceptata kiel enigmo. Plej verŝajne ankaŭ lia populareco baziĝas sur mensogo, kaj la homoj enketitaj kaj surstrate demanditaj mensogas, kiam ili pledas por Putin, ĉar ili timas la potencon kaj la policon. Povas esti, ke ili estas influitaj de ŝtataj propagandaj mensogoj, kiujn produktas kaj kontrolas la plej krudaj rusaj demagogoj, kaj fortranĉitaj de la diskuto en Okcidento. Ruslando restis izolita lando (ĉu kun aŭ sen sankcioj), pro kio plej diversaj krudaj mensogoj kaj konspiraj teorioj povas facile prosperi kaj atingi la vastan publikon pere de la ŝtata televido, kiu estas kontrolata de la Kremlo.

Kontrolataj de la Kremlo estas ankaŭ ĉiuj balotoj kaj statistikoj, kiuj kutime estas manipulataj kaj falsitaj. Tio estas la kazo ne nur en Rusio mem, sed en ĉiuj aliaj landoj, kiuj estas influitaj de Moskvo kaj kie la malnova sovetia sistemo ankoraŭ vivas kaj funkcias, ekzemple en Belorusio kaj la mezaziaj respublikoj, kiuj estas regataj de krudaj diktatoroj de la sovetia-orienta tipo, kaj antaŭe en ĉiuj komunismaj landoj en la tuta mondo. Sed la rusoj estas unikaj en ĉi tiu rilato de drasta kaj senskrupula mensogado: Ili kapablas okazigi manipulitajn kaj falsitajn balotojn kvazaŭ temus pri tute normalaj demokratiaj voĉdon-proceduroj, kvankam ili havas nenion komunan kun demokratio. En la mondo tiuj fifamaj pseŭdo-balotoj jam delonge ne plu estas kredindaj kaj konsiderataj kiel kontraŭleĝaj kaj neakcepteblaj.

[11] Vd. https://www.nzz.ch/meinung/sergei-gerasimow-kriegstagebuch-aus-charkiw-teil-26-ld.1697809?mktcid=nled&mktcval=174&kid=nl174_2022-8-18&ga=1
[12] Vd. https://www.nzz.ch/feuilleton/wiktoria-amelina-hector-abad-ueber-die-ermordung-einer-freundin-ld.1745979?mktcid=nled&mktcval=174&kid=nl174_2023-7-6&ga=1.

Pri la politikaj intencoj de la Kremlo daŭre aperas miskomprenoj inter okcidentaj politikistoj, kiuj kredas oficialajn deklarojn (vortojn) de rusaj politikistoj kaj faras siajn (malĝustajn) konkludojn el tiuj deklaroj, kiuj kutime estas falsaj kaj mensogaj. Ekzemple la Kremlo diris en 2022 mallonge antaŭ la atakado de Ukrainio, ke la mobilizo de rusaj trupoj ĉe la ukraina limo servas nur al ekzerco kaj ke Ruslando ne atakos Ukrainion. Sed poste ĝi tamen atakis kaj invadis ĝin. Do, la okcidentaj politikistoj prefere ne kredu la deklaraĵojn (vortojn) de la Krem-lo, sed nur la konkretajn agojn de rusaj politikistoj.

En Sovetunio – kaj hodiaŭ denove en Ruslando – la mensoga praktiko ekzistis ĉie kaj ĉiam – en la gazetaro, televido, radio, en la lernejoj, en lernolibroj kaj ĉe la instruistoj, en ekspozicioj, statistikoj, en la justico kaj ekonomio kaj nature en la politiko. La ŝtato trompis siajn civitanojn kaj la civitanoj trompis la ŝtaton. Tiaj estis la reguloj de la ludo, kiuj estis kompreneblaj al ĉiuj. Ekde la infanĝardeno la homoj alkutimiĝis al ili. En tiu pejzaĝo de mensogoj ĉiuj homoj en Ruslando kaj Sovetunio adoleskis. Dum jarcentoj konatoj, amikoj, parencoj kaj fremduloj mensogis kaj estis primensogitaj, kaj neniu sentis sin ĝenata, neniu kredis unu la alian. Sur grandaj afiŝoj oni klarigis al la homoj, ke Sovetunio estas la bastiono de la paco, kaj samtempe oni sendis tankojn kaj armilojn al la tuta mondo. Orienta Berlino 1953 kaj 1961, Budapeŝto kaj Pollando 1956, Prago 1968, Afganio 1979, Varsovio 1981, Vilno 1991, Ukrainio 2022 (kie okazis vera milito) ktp. La militajn atakojn kaj invadojn oni pravigis per „frata helpo“ aŭ „liberigo de kontraŭ-revoluciuloj“, „imperiistoj“ aŭ de „naziistoj kaj faŝistoj“ kiel en la plej aktuala kazo de Ukrainio. Kvankam en la koncernaj landoj ekzistis nek kontraŭ-revoluciuloj nek imperiistoj nek naziistoj aŭ faŝistoj. Ĉio ĉi estis granda mensogo, kiu servis sole al la celo de la restabiligo de la sovetia aŭ rusa imperiisma potenco en tiuj landoj, kiujn Moskvo traktis kiel rabaĵon el la dua mondmilito kaj ekonomie ekspluatis ilin (nun Ruslando rabas grandstile ukrainan tritikon). Aŭ kiujn Ruslando pretendas kiel parton de la iama imperio kaj do konsideras ilin kiel historian posedaĵon. Oni ankaŭ asertis, ke la sovetia armeo estis vokita al Afganio por savi – ne klaris kion. Oni mensogis pri aviadilaj akcidentoj kaj aliaj katastrofoj, ekzemple Ĉernobilo. Se la rusa registaro diris, ke danĝero ne ekzistas, la homoj sciis, ke la situacio estas ege malbona kaj danĝera. Oni mensogis pri la eksoficigo de Ĥruŝĉov, pri la malsanoj de Breĵnev, Andropov kaj Ĉernenko, pri laŭdira malsano de Gorbaĉov okaze de la puĉo en aŭgusto 1991 (kun la celo forigi lin de la potenco). Oni mensogis pri la pasinteco, nuntempo kaj estonto, pri la historio, pri ĉiu evento grava aŭ malgrava, fakte kaj principe pri ĉio ajn. Aliflanke oni entuziasme raportis pri la plenumado de la kvinjaraj planoj, kvankam la vendejoj estis malplenoj de varoj. La sovetianoj vivis en la plej felica lando de la mondo, en kiu la socialismo venkis, en kiu laŭleĝe la popolo posedis ĉion, kvankam ĝi posedis nenion. La vero estis, ke la sovetia popolo vivaĉis en mizero, en malgrandaj loĝejoj sen komforto, kun minimuma elekto de varoj kun malbona kvalito. Pri Sovetunio oni parolis kiel la „dua mondo“. Por kaŝi la tutan mizeron la registaro postulis pozitivajn raportojn pri sukcesoj, progresoj kaj rekordoj kaj rikoltis falsitajn raportojn kun mensogoj. Oni devis mensogi sed ne kredi. Se iu ne kunludis tiun ludon, li aŭ ŝi estis kritikita, arestita, izolita, mortigita.

La instruistoj (plej ofte temis pri instruistinoj) preparis la infanojn al vivo de mensogoj por savi ilin de la malbono; oni instruis al ili: se vi diras la veron, vi estas perdita. En Sovetunio oni devis diri la ĝustajn kaj eviti la danĝerajn vortojn. Oficiala limo ne ekzistis, sed ĉiu homo sentis ĝin. Disidento kiel la verkisto Solĵenicin malrespektis tiujn limojn kaj regulojn kaj ne pretis mensogi kaj tial ekhavis gravajn problemojn kun la potenco.

Pri la temo de la mensogo kaj ĝia ligo kun la perforto Solĵenicin cetere diris en sia parolado okaze de la transdono de la Nobelpremio por literaturo en 1970:

„ … Ni ne forgesu, ke perforto ne vivas sole kaj ne kapablas vivi sole: ĝi nepre estas interplektita kun la mensogo. Inter ili situas la plej intimaj, plej profundaj el la naturaj ligoj. Perforto trovas sian solan rifuĝon en la mensogo kaj la mensogo sian solan apogon en la

perforto. Ĉiu homo, kiu iam aklamis perforton kiel sian METODON, devas senkompate elekti la mensogon kiel sian PRINCIPON."[13]

Tiel aperis la timo kaj la arto de la (plu)vivado – kiu konsistis en tio diri la unuan, pensi la duan kaj fari la trian aferon. La disigita ambigua konscio (kaj konscienco) karakterizis la realecon de tuta nacio. Ĉiuj nuntempaj rusoj originas el tiu falsa realeco, ankaŭ la regantoj kaj opoziciuloj. Oni parolas pri la duobla vizaĝeco de la rusoj, kiuj montras alian vizaĝon sub la masko.

Ĉi tiu mensogado eĉ ne estas malmorala, se oni konsideras la situacion de la pluvivantoj en koncentrejoj de la gulago. La volo pluvivadi en tiuj lokoj malantaŭ bariloj postulas de la ekzist-minacata individuo certajn kvalitojn, la konstruo de la psiko ŝanĝiĝas. Tio havas sekvojn por tuta popolo, kiu transdonas tiujn kvalitojn kaj spertojn de generacio al generacio. La elmigrinta rusa filozofo Nikolaj Berdjaev skribis en 1939: „La homoj vivas en la timo kaj la mensogo estas ilia armilo por defendi sin." Kiel dirite, la popolo timis la potencon, kaj la potenco timis la popolon, pro kio ambaŭ partioj partoprenis en la mensogo. Tiel, la mensogo fariĝis ĝenerale akceptita rimedo por la sekurigo de la ekzistado kaj pluvivado, kiu baziĝis sur perforto kaj timo.

Se oni volas lerni kompreni la kulturon, tradicion aŭ logikon de rusaj mensogoj, oni devas kompreni ilian „konspiran" karakteron kaj starigi vortaron de erarigaj nocioj por malkonfuzigi la kaoson, traduki el la falsaĵo al la klaraĵo, senkodigi la „falsajn amikojn", kiuj ekzistas en ĉiu lingvo. Se temas pri la rusa mondo, preskaŭ ĉiuj vortoj ŝajnas esti „falsaj amikoj". Eble tiam oni sukcesos kompreni la rusan „enigmon", „misteron", „sekreton" – kvankam la rusoj estas nek enigmaj, misteraj aŭ sekretaj estaĵoj kiel ĉiuj ceteraj popoloj. Ekzistas nur mankanta scio kaj mankanta sperto pri la mentaleco de iu popolo.

* * *

Pri semantiko temas ĉi tiu alineo. Sovetunio kaj Ruslando de la dudeka jarcento estas laboratorio por studi totalismajn mensogojn, emfazis la redaktoro de la franclingva antologio „Un mensonge déconcertant?" La Russie au XXe siècle», aperinta en 2003, Jean-Philippe Jaccard de la katedro pri rusa literaturo kaj civilizo ĉe la Ĝeneva Universitato. Ĉu mensogis tiuj, kiuj verkis entuziasmajn taglibrojn kaj leterojn en la juna Sovetunio, vide al tio, kio sekvis ? Poste ili ĉiuj kiel Andrej Belyj, Miĥail Bulgakov, Boris Pilnjak, Evgenij Zamjatin kaj multaj aliaj turnis sin al la diktatoro en malespero kiam ili bezonis helpon, kiel oni preĝas al Dio, per mensogoj, pentante kaj konfesante siajn „pekojn". La ĝeneva slavisto Georges Nivat opinias, ke la kutimo mensogi restis en la genoj de la sovetiaj homoj. La specifa normo estis la legado inter la linioj, ĉar la mensogo per nemencio aŭ prisilentado estis la regulo. La Stalinaj reprezalioj estis vualitaj per enigmaj formuloj; verkoj, kiuj ne estis akcepteblaj, estis prisilentataj, ekzemple la romano „doktoro Ĵivago" (1957) de Boris Pasternak. Verkoj kiel „La majstro kaj Margarita" (1962) de Miĥail Bulgakov estis krude cenzuritaj kaj misformitaj. Stalinismaj verkistoj komencis reverki siajn verkojn. Ankaŭ „Homoj, jaroj, vivo" (1891-1954) de Ilja Ehrenburg restas monumento de la duonvero.

La verketo „Unu tago en la vivo de Ivan Denisoviĉ" de Aleksandr Solĵenicin publikigita en 1962 en Moskvo, rompis la sorĉon de la mensogo. Sed en sia observaĵo Jean-Philippe Jaccard montris, ke eĉ tiu verema disidento ne estis imuna kontraŭ la refalado en la kaptilojn de la antaŭjuĝoj. Temas pri la verkego „Ducent jarojn kune", kiu estas duvoluma monografio de Solĵenicin pri la historio de la judoj en Ruslando, kompilaĵo de citaĵoj kaj personaj opinioj, kiu aperis en putinisma Ruslando, kie Solĵenicin jam parolis alian lingvon. Bedaŭrinde, ĝi ne estas libera de implica antisemitismo, tiel ke oni povas utiligi tiun verkon nur kun granda sin-

[13] Laŭ https://www.nobelprize.org/prizes/literature/1970/solzhenitsyn/lecture, ĉap. 7.

gardo, bone konante la temaron, kiun ĝi traktas, ĉar ĝi povas enteni falsajn interpretojn kaj mensogojn.

Alia romanda slavisto, Patrick Sériot, faris distingon inter morala kaj semantika vero. Personecoj kiel Aleksandr Solĵenicin kaj Andrej Saĥarov ofertis la moralan reziston kontraŭ mensogoj. Sed la intelekta diskurso pri la rimedoj, per kiuj la vero povas esti generita, situas sur la semantika nivelo. La sovetia potenco prenis la ekskluzivan rajton krei novajn vortojn. La sovetia frazeologio estis uzata por propagando aŭ por kovri per vortoj, malantaŭ kiuj la realeco iĝas nevidebla. Tiel la sovetia lingvouzo aperis kiel paralelo al la reale restrukturita socio. Sed kio fariĝis, Sériot demandas, el la lukto por la vera signifo de la vortoj post la falo de la komunismo ?

Laŭ Michel Heller la sovetiaj civitanoj estis semantike dulingvaj en la orvela signifo. Laŭ la situacio la parolantoj elektis la rusan aŭ la sovetian lingvon: „Suspektemo", „malamiko de la popolo", „entuziasmo de la amasoj" estas nur kelkaj el la terminoj, kies oficiala signifo estis diametre kontraŭa al la interpreto donita al ili de la loĝantaro. Oni povas paroli pri inversigo de la signoj: „Abundo" signifis „mankon", „prospero" signifis „stagnadon". Tio estis la tipa lingvaĵo de la mensogo.

Alia esprimformo de la mensogo estis la sovetia arto kun sia duobla aspekto de la realismo kaj ideologia karaktero de la totalisma kompreno de la vero. Antoine Baudin vidas grandegan fabrikon de manipulitaj kaj misutiligitaj bildoj en Sovetrusio. En 1934 la „socialisma realismo" estis proklamita kiel sola valida doktrino por ĉiuj branĉoj de la arto en Sovetunio.[14] La socialisma realismo estis do el duobla senco la perfekta fikcio, trompo, mensogo.

* * *

Por reveni al la plej aktuala tempo, ni estas alfrontitaj ĉiutage kun senlima amaso da sistemecaj mensogoj produktitaj de la demagogia rusa propagando lige kun la milita operaco, kiun Moskvo gvidas kontraŭ Ukrainio ekde la 24a de februaro 2022. Laŭ ĉi tiu logiko, terminoj kaj nocioj kun negativa konotacio estas ĉiam pli anstataŭigitaj en Rusio. Ekzemple oni ne plu havas incendiojn, sed „fajro-alarmojn", ne plu ŝrumpan ekonomion sed „negativan kreskon" ktp. La publika uzado, ekzemple en la gazetaro, de la vorto „milito" lige kun la kontraŭukrainia militoperaco estas malpermesata. Lezantojn de tiu nova leĝo atendas multjara arestpuno en malliberejo. Ĉu okazas amasa murdo (genocido) al rusoj aŭ ukrainoj ? Ĝi ne okazas kaj neniam okazis en Ukrainio lastatempe. Ankaŭ ne en la Donbaso. Fakte okazis kaj okazis amasmortigo de la ukrainia civllpopolo fare de la rusa armeo, miloj da rusaj kaj ukrainaj soldatoj pereis en la bataloj. Oni parolas pri militkrimoj ĉefe plenumitaj de la rusa armeo. Oni celas „malnaziigi" Ukrainion, kvazaŭ Ukrainio konsistas nur el nazioj aŭ laŭdire estas regata de iu nazia reĝimo aŭ registaro. Fifama ĉi-rilate estis la „Azova regimento", sed en la pasintaj jaroj ĝi estis reorganizita, grandparte perdis sian „nazian" karakteron kaj estis integrita en la ukrainian nacian gvardion. En Ukrainio ne ekzistas pli da (novaj) nazioj ol en ajna alia lando de Eŭropo, inkluzive Ruslandon, kie aktivis/as diversaj fifamaj novnaziaj bandoj, pri kiuj oni ne raportas en Ruslando, same kiel oni publike ne diskutas pri la t.n. Holodomoro, la terura malsatkrizo lanĉita de Stalin en la jaroj 1932-33, kiu kaŭzis milionojn da mortviktimoj en Ukrainio kaj estis interpretita de ukrainoj kaj aliaj kiel genocido kontraŭ la ukraina popolo. Ne estas oportune, necese aŭ utile trakti tiun historian katastrofon en putinisma Ruslando, kiu rifuzas repritaksi ĝin kun la argumento, ke tiu temo disigas rusojn kaj ukrainojn. En Ruslando ekzistas sennombraj tabuitaj temoj, same kiel en Sovetunio. Al tiuj apartenas la grandskalaj stalinismaj reprezalioj, amasmurdoj kaj la deportadoj de la ĉeĉenoj, krimeaj tataroj kaj aliaj sovetiaj popolgrupoj. La vero estas, ke tiuj temoj ĝenas la koncepton de Putin, kiu celas rehonorigi Sovetnion. Esplorcentroj (kiel „Memorial") kaj diversaj individuaj historiistoj, kiuj publike okupiĝas pri tiuj temoj, estas konsiderataj kaj traktataj kiel ŝtataj malamikoj, mal-

[14] Vd. https://www.nzz.ch/article8T8MR-ld.256300.

helpataj labori, persekutataj aŭ malpermesataj. Estas logike, ke pri tabuitaj temoj oni kutime disvastigas diversajn legendojn kaj mensogojn. Ekzemple la kaŝita apliko de la gazetara cenzuro povas esti neita, ĉar libereco de la gazetaro estas formale garantiata de la konstitucio, same la homaj rajtoj, kiuj estas lezataj. Ktp. Rusio komplete ĉesis en ĉiuj rilatoj respekti iujn ajn ĝenerale agnoskitajn moralajn normojn kaj principojn kaj preferas prezenti plej diversajn mensogojn. Eĉ la iamaj duonkrimaj ŝtatkomunistoj reprezentis pli altan moralon, kiu komplete perdiĝis en la epoko de Putin. Groteska kulmino de la tabuado de tiklaj temoj estas atingita, kiam Putin mem prisilentas la militan operacon kontraŭ Ukrainio, kiun li lanĉis, en siaj oficialaj publikaj ŝtataj paroladoj kaj parolas pri ĉio ajn alia, kvazaŭ tiu milito ne okazus.[15] Sed tio estas karakteriza por li. Kompreneble ankaŭ ajna kritiko pri Putin estas komplete tabua en la ŝtate kontrolataj amaskomunikiloj. En siaj rakontoj la rusoj perdis ĉian objektivecn, se ii mencias nur tion, kio utilas al ilia propagando kaj estas je ilia avantaĝo, dum ĉiujn tiklajn problemojn ili prisilentas. Sub tiaj kondiĉoj eraroj de la politiko ne povas esti publike analizataj kaj diskutataj, kiel tio okazas en okcidentaj demokratiaj landoj, tiel ke plej sovaĝaj kaj absurdaj mensogoj povas prosperi. Tiel Putin ne povas esti nomita militkrimulo, lia ŝtato ne povas esti denuncita kiel mafia aŭ polica ŝtato kaj pri la „speciala operaco“ kontraŭ Ukrainio ne povas esti skribita kiel agresmilito. Fakte, Ruslando transformiĝis al nova postsovetia „totalisma“ (milit-)diktaturo kun faŝismaj trajtoj, eĉ Se la Konstitucio deklaras Ruslandon demokratio.

Granda problemo de Rusio estas, ke ĝi tute ne pretas vidi kulpon ĉe si mem, sed male, kutimas kulpigi aliajn – ukrainojn, la „kolektivan“ Okcidenton, Eŭropon ktp. Racie kaj normale rilati kun tia malfacila partnero fariĝas nature treege malfacile.

La rusa informa politiko konstante ŝanĝas la bildon de la situacio, depende de la strategia aŭ taktika politiko de la aktuala momento, kiu estas difinita en la Kremlo. Tio garantias la kondiĉojn por la apero de diversaj kontraŭdiroj kaj novaj (propagandaj) mensogoj. Ne gravas, ĉu okazis iu grava eraro, Putin, la genio, ĉiam trovas iun pravigon, laŭ kiu la tuta propagando fajfos kaj dancos. Pro tio preskaŭ ĉiutage aperas novaj surprizoj. Por pravigi la militon kontraŭ Ukrainio la Kremlo produktis kaj produktas sennombrajn materialojn. La ĉefa aŭtoro estas prezidento Vladimir Putin mem, kiu en 2021 publikigis historiografian eseon, en kiu li proklamis, ke memstara ukraina popolo ne ekzistas kaj neis la ukrainan ŝtatecon. Eĉ pli sovaĝajn asertojn konstante liveras Sergej Lavrov, ministro pri eksteraj aferoj de Ruslando, kiu perdis ĉian objektivecon. Paralele agadas diversaj ĵurnalistoj kiel Vladimir Solovjov, Dmitrij Kiseljov kaj Margarita Simonjan, kiuj servas kiel ĉefaj protagonistoj de la kontraŭ-ukrainia kaj kontrau-okcidenta propagando kaj reproduktas la politikajn mensogojn de Putin, same kiel la oficialaj parolistoj de la Kremlo kaj la ministerio por eksterlandaj aferoj, Dmitrij Peskov kaj Marija Zaĥarova. Supozeble ili estas sufiĉe inteligentaj por kompreni, ke ili ĉiuj mensogas en la nomo de la rusa ŝtato. En Okcidento oni havas neniun imagon, kiujn absurdajn politike oportunajn mensogojn ili disvastigas en la rusa televido, ĉar la plimulto de la homoj en Okcidento ne spektas rusan televidon kaj ne komprenas la rusan lingvon, do la senhontaj falsaj asertoj de tiuj rusaj ĵurnalistoj estas limigitaj al la ruslingva mondo, kie ili difektis la menson de grandparto de la tie vivantaj homoj, kiuj apogas la politikon de Putin, dum ĉiuj ceteraj civitanoj jam delonge forlasis Rusion por eviti tiun diablan propagandon, kiu povas konduki al la eksplodo de mondmilito, se oni ne haltigas ĝin. Kiel propagandiloj por la okcidenta publiko servas diversaj dubindaj gazetaraj produktoj, kiuj principe entenas la samajn mensogojn kaj estis parte malpermesitaj en Eŭropo.

Kiel atestis la ukraina kritika ĵurnalisto Stanislav Aseev (el Doneck) en siaj legindaj gazetaraj artikoloj de 2015/16, aparte drasta estas la situacio en la ruse okupata Donbaso, kie

[15] La tuta mensoga kaj altgrade hipokrita sinteno, priskribita de Miĥail Ŝiŝkin en ĉi tiu teksto, estas imprese spektebla laŭ tiu ĉi ekzemplo, [http://kremlin.ru/events/president/news/68650](http://kremlin.ru/events/president/news/68650), kiu vide al la kruela milito en Ukrainio jam aspektas kiel cinika absurda spektaklo.

regas milito kaj teroro, nuda rusa agresemo akompanata de idiotisma propagando nutrata de krudaj mensogoj kaj trompoj. En unu el siaj artikoloj li skribis: „La morto estas la plej bona propagando. Kaj en Moskvo oni scias tion. Dum ni kiel lando provas trovi "honestan respondon“ al la mensogoj el la Kremlo, ĉi tie la kadavroj estas stakigitaj.” Por sia kuraĝa dokumenta kaj informa laboro li estis grave punita de la kontraŭleĝe regantaj doneckaj aŭtoritatoj kaj pasigis plurajn jarojn en teruraj prizonoj.[16]

Abundas aliaj krudaj mensogoj de Putin, ekzemple la aserto, ke per la liverado de pezaj kaj modernaj armiloj la Okcidento celas plilongigi la militon en Ukrainio aŭ ke la Okcidento kulpas pri la minacanta malsatkrizo en la mondo, ĉar la tritiko ne povas esti eksportita el Ukrainio, kies havenoj estis blokitaj de rusaj militŝipoj. Ankaŭ la malsankta komplico de Putin, patriarko Kiril, atentigis pri si per diversaj asertoj, kiuj estas nenio alia ol krudaj tordoj, falsoj kaj propagandaj mensogoj, ekzemple la eldiro, ke la Okcidento kulpas pri la milito en Ukrainio aŭ la certigo, ke Ruslando volas konkeri neniun, sed oni batalas nur por savi la civilizon. Praktike, tiu rusortodoksa ekleziulo donis sian benon al la milito kontraŭ Ukrainio, kio signifas, ke li subtenas ĝin. La ĉefa mensogo de ĉiuj ĝisnunaj mensogoj de Putin estas la aserto, ke la „kolektiva“ Okcidento kaj NATO militas kontraŭ Rusio – kruda kaj plumpa tordado de la vero. La simpla vero estas, ke Rusio lanĉis agresmiliton kontraŭ Ukrainio kaj la okcidentaj landoj reagis per ekonomiaj sankcioj kontraŭ Rusio por puni ĝin kaj malhelpi, ke ĝi povu daŭre financi kaj gvidi la militon.

Ĉi tiu milito estas pravigita per plej diversaj krudaj kaj perfidaj mensogoj, kiuj estas ŝajne karakterizaj kaj specifaj por la sovetia kaj ruslanda civilizoj. Iuj jam estis menciitaj en ĉi tiu artikolo. La mensogo estas la ĉefe psikologia rimedo, per kiu la regantoj en Ruslando ne nur nebuligas kaj malklarigas la kapojn kaj mensojn de la homoj, kiuj loĝas en tiu lando, sed ankaŭ trompas kaj erarigas la mondan publikon. Tiel la kategorioj de objektiveco kaj subjektiveco, vero kaj malvero, bono kaj malbono, sed ankaŭ viktimoj kaj krimuloj aŭ kulpuloj estas konfuzitaj. Tio havas sukceson precipe ĉe maljunaj homoj, kiuj konsumas la ŝtatan televidon kiel ĉefan informfonton, dum la interreto (kiu estas tre heterogena kaj povas konfuzi la homojn eĉ pli forte, ĉar en ĝi cirkulas plej diversaj "veroj") atingas nur parton de pli junaj generacioj. Sed kiel montris la milito kontraŭ Ukrainio, ankaŭ intelektuloj, akademianoj kaj homoj de la meza tavolo infektiĝis de tiu viruso kaj apogas aŭ kredas la kremlan propagandon, en kiu elstaras ekzemple la cinika kaj komplete falsa aserto, ke Ukrainio estas regataj de nazioj kaj ke oni devas sennaziigi ĝin. Kompreneble, nazioj tie praktike ne ekzistas, maksimume ukrainaj naciistoj aŭ patriotoj, same kiel en Ruslandp. Sed tiu propagando funkciis kaj konvinkis grandparton de rusoj pri la neceso gvidi militon kontraŭ la “frata popolo”. Kun fatalaj sekvoj kaj dek- aŭ centmiloj da militviktimoj, mortintoj kaj vunditoj, pri kiuj respondecas kaj kulpas Putin kaj tiuj rusoj, kiuj apogas tiun militon. Eĉ pli granda rusa mensogo estas, ke la Okcidento kondukas militon kontraŭ Ruslando. Plej verŝajne ankaŭ tiun legendon multaj rusoj kredas, pro kio ili apogus ankaŭ rusan militon kontraŭ la Okcidento en la espero, aŭ konvinko, ke ili venkos (grava nocio en la historia kaj aktuala rusa konscio). Sed tia aventuro povus signifi la finon de la ruslanda civilizo, kaj Putin certe scias tion.

Al la globala konfuzo brile kaj cinike kontribuis la "trola fabriko" de la (intertempe pereinta) Putin-amiko Evgeno Prigoĵin, kiu zorgis pri la senskrupula kaj senhonta disvastigo de miloj da falsaj komentoj en la eksterlanda gazetaro por kaŭzi gigantan konfuzon ĉe la legantoj kun la celo, ke ili kredu la rakontojn kaj legendojn de la Kremlo, kiu estas regata de iamaj KGB-uloj, kiuj lernis ĉiuspecajn malpurajn metodojn por konfuzi la "malamikojn". La propagando de la Kremlo kaj komplete manipulata ŝtata televido estis tiel efika, ke ekzemple familianoj, kiuj telefone komunikas kun siaj edzoj kaj filoj, kiuj militas en Ukrainio, ne kredas, kion ili rakontas, ĉar el la ŝtate kontrolataj amasmedioj ili ricevis komplete aliajn ver-

[16] Vd. Stanislav Assejew: In Isolation. Texte aus dem Donbass. Berlin 2020, p. 136.

siojn. Tiel povis prosperi la fifama "duobla pensado", kiun Georgo Orvelo genie utiligis en sia famega romano "1984". Ekzakte tiu scenaro krude efektiviĝis en Ruslando de Putin. Sed ne nur temas pri mensogado mem, sed ankaŭ pri memtrompado, de kiu estas koncernitaj ankaŭ la skizofreniaj kaj paranojaj rusaj regantoj mem. Kun tio estas ligita totala malestimo de la popolo fare de tiuj regantoj, kiun ili kontrolas – timante, ke ĝi povus ribeli, ĉar sub la surfaco de la rusa realeco regas grandega malkontento (kio estas unu el la konstantoj de la rusoj – do la aserto de la Kremlo pri kontenteco kaj unueco de la ruslanda popolo, kiu amas siajn gvidantojn, estas aliaj mito kaj mensogo kun historia signifo). Centmiloj da rusoj estas senditaj al Ukrainio, kie multaj neeviteble atendas la certan kaj tragikan morton en la bataloj, dum iliaj hejmaj familioj en fora Siberio ricevas la malpuran monon cinike promesitan de la Kremlo por ĉiu pereinta soldato. Alia afero: Dum la ruslandaj regantoj konstante polemikas kontraŭ la Okcidento kaj eĉ publike minacas ĝin neniigi per nukleaj armiloj por timigi la mondon, ili sendas siajn infanojn en eŭropajn landojn, por ke ili estu sekuraj kaj povu bone vivi kaj studi, malgraŭ sankcioj kontraŭ tiuj homoj. La mono (temas pri milionoj kaj miliardoj, kiuj estis ŝtelitaj de la ruslanda popolo, kiu mizeregas) estas ĝirata al okcidentaj bankoj, por ĝui ilian protekton. Ho kia abomena spektaklo! La rusa psikologio estas komplika kaj perversigita. Dum la regantoj praktikas ĉiujn ĉi aĉajn fifarojn, ili klopodas forpuŝi siajn krimojn kaj mensogojn el siaj mensoj kaj el la publikaj konscio kaj atento mem, ne pro malbona persona konscienco, sed ĉar ili timegas, ke ĉiuj publikaj atento kaj diskuto pri tiuj faroj, mensogoj kaj trompoj povus endanĝerigi ilian potencon, kiun ili volas okupi eterne, kaj konduki al ĝia kolapso, inkluzive personan finon laŭ la modelo de Ceauşescu, Sadam Husein, Gadafi, Asad kaj kompanio, pri kio esperas la tuta demokratie, liberece kaj humanisme orientita homaro.

Kiel montras la ekzemplo de la akuzo pri naziismo en Ukrainio, per tiu rimedo estas kulpigita aliaj landoj kaj popoloj pri certaj okazaĵoj, kiuj estas videblaj en Ruslando mem. Pluraj observantoj parolis pri tio, ke en Ruslando mem regas faŝismo, do la kremlaj regantoj ege klopodas sufoki tiajn kritikojn, riproĉojn kaj akuzojn, kiujn ili plumpe renversas kaj resendas al iliaj aŭtoroj kaj ekspedintoj. Fakte ekzistas rusdevenaj analizoj (el kremla perspektivo) pri la laŭdira situacio en Ukrainio, kiuj ekzakte priskribas la realecon en Ruslando mem. Ankaŭ tio estas ruza kaj perfida metodo defendi sin kontraŭ kritiko kaj akuzoj per analoga simetria renverso. Ĉi tiun dubindan arton la rusoj ekstreme perfektigis, regas, aranĝas kaj aplikas pli bone ol ĉiuj aliaj. Ĉi tiuj arto kaj metodo estas samtempe la genezo de ĉiuj rusaj mensogoj kaj falsoj. Kiu en Ruslando aŭdacas kontesti aŭ kritiki la mensogojn de la Kremlo, riskas malaperi longan tempon en kruelaj gulagecaj siberiaj malliberejoj, nomitaj kolonioj, kie ili fine povas perdi sian vivon kiel tio okazis al la politika opoziciulo Alekseo Navalnyj, dum aliaj, precipe nerusoj kaj eksteruloj el t.n. “malafablaj landoj” (ĉefe eŭropaj kaj okcidentaj, kiuj aplikas sankciojn kontraŭ Moskvo), kiuj publike esprimas sin kontraŭ la (milit)politiko de la Kremlo, estas simple misfamigitaj kiel rusfobiuloj (t.e. malŝatantoj de la rusoj) kaj simile, same kiel oni siatempe pritaksis ilin kiel antisovetiajn elementojn. La spirito estas kaj restis la sama: Ruslando defendas sin kontraŭ la tuta mondo, kiu laŭdire malamas ĝin kaj volas ĝin neniigi… Laŭ Freud estas senespere klarigi al la aŭtoroj de tiaj imagoj kaj projekcioj la erarecon de ilia percepto.[17] En tio konsistas la tuta frenezeco de la afero, kiu estas grandparte malkasita. Do, sendube fariĝis pli malfacile por la Kremlo konvinki la rusan kaj mondan publikojn per ĝiaj primitivaj mensogoj.

Krom Putin, deklarita de la Okcidento kiel supozata militkrimulo, intertempe ja aperis aliaj analogaj aŭtokratismaj gvidantoj kun tutmonda signifo, ekzemple Xi en Ĉinio kaj Trump en Usono. Tiuj monstroj posedas multajn similajn kaj komunajn trajtojn kaj tial devas esti

[17] Surbaze de la libro Olaf Kühl: "Z". Kurze Geschichte Russlands, von seinem Ende her gesehen. Berlin 2023, precipe p. 26-28.

konsiderataj altgrade danĝeraj por la mondo, homaro kaj civilizo de la planedo, eĉ por la propraj landoj mem, kiujn ili regas kaj celas meti sub sian totalan kontrolon.

Intertempe oni scias, ke Putin celas rekonkeri teritoriojn en orienta Eŭropo, kiuj iam apartenis al la Ruslanda Imperio. Tio povus signifi novajn militojn kontraŭ aliaj landoj. Plej verŝajne Kiril donis aŭ donos sian benon ankaŭ al tiu plano. Ĉu la militaj informoj, kiujn general-majoro Igor Konaŝenkov ĉiutage elpuŝas, estas veraj aŭ ĉu temas pri propagandaj mensogoj, neniu sendependa instanco povas kontroli, same diversajn asertojn de la ukraina flanko, ekzemple, ke intertempe la rusa armeo perdis en Ukrainio pli ol 32 mil soldatojn.[18] Ĉar Ruslando ne progresis tiel sukcese kiel planite en Ukrainio, la fiasko kaj la tuta katastrofo, kiun Ruslando aranĝis en Ukrainio, devis esti kaŝita per diversaj propagandaj mensogoj. La ĉefmensogo estos preta, kiam Putin proklamos la venkon en la milito, eĉ se li perdis ĝin. En tia kazo li simple kaj arbitre ŝanĝos la temon, kiel li ofte faris tion en la pasinteco,laŭ la aktuala politika situacio kaj aktuala opinio de Putin mem.[19] Orvelo salutas. Sed Putin ankoraŭ ne venkis la militon, ĉar laŭ la opinio de la Dumao-deputito kaj eksmilit-estro Andrej Guruljov (la sama kiu minacis la anglojn per militatako kaj pledis por apliko de atombombo en Ukrainio) la rusan armeon regas kaj malhelpas altgrada mensoga kulturo (sept. 2023). Absurde, ĉu ne!

* * *

Kun Anna Ŝor- Ĉudnovskaja[20] oni povas konkludi, ke Vladimir Putin, kiu regas en Ruslando jam la 23an jaron, kreis aŭtokration, kiu prosperas per cinika detrua nihilismo, anstataŭ pozitiva perspektivo de pli bona estonteco por la homoj. En tiu tempo li prezentis eĉ ne unu videblan politikan ideon aŭ programon, kiu meritus tiun nomon, sed nur kreis ideologian nebulon, kiu plej verŝajne forfluos kaj kondukis al granda milito en Ukrainio. Fakte, la milito en Ukrainio fariĝis ebla nur, ĉar la rusa registaro konstante mensogis de jaroj kaj ĉar la homoj en Rusio akceptis la mensogojn. Al ili mankas interna defendo kontraŭ mensogoj, ĉar la patosa kaj samtempe deloga mensoge elpensita mondkoncepto de Putin estas por ili pli komforta ol la realeco, kiu estas plene ligita kun konfuzaj kontraŭdiroj.

Antaŭ ĉio, ĉi tiun mondkoncepton subtenas la sovetia pasinteco, kiu neniam estis funde analizata kaj publike traktata de la socio. En tiu mondkoncepto reaktualiĝis la glorado de Stalino kaj lia heroa rolo en la dua mondmilito. Dum la problemo de la „totalisma“ karaktero de tiu epoko estas puŝita flanken, reemfaziĝas la eŭforia mito, ke gravas daŭrigi la venkon super Nazia Germanio kaj la faŝismo. Tiun faŝismon la rusoj trovis en Ukrainio. La senskrupula propaganda mensogo pri la necesa „malnaziigo de Ukrainio“ ne estus ebla sen tiu mensoga historia konstruaĵo kaj la danĝera manipulado de la „venka konscio“.

Multaj el takseble cent mil civitanoj, kiuj forlasis Rusion post la 24a de februaro 2022, diras: Mi ne povis resti, ĉar mi ne volis plu mensogi. Ŝajnas, ke la politikon de la lastaj du jardekoj ili konsideras fatale erara. La reĝimo de Putin profitis ne nur de la enspezoj el gaso kaj nafto, sed ankaŭ de la multaj homoj, kiuj preferis ignori, kion faras la ŝtatestro. Kio ajn okazis „tie supre“, la loĝantaro sciis, ke estas pli bone ne interesiĝi pri tio. Ignori la realon estas unu el la plej gravaj maksimoj en la politika kulturo de la nuna Rusio. Temas pri la totalaj indiferenteco kaj pasiveco, unu el la tipaj karakterizaĵoj de la politika kulturo de Ruslando, kiu ŝajnas esti fortranĉita de la cetera mondo. Nur du specoj de lojaleco estas permesataj: laŭta kaj sincera subteno, aŭ silenta kaj hipokrita subteno, lojaleco „kvazaŭa“. Dum multaj jaroj la urbaj mezaj kaj superaj tavoloj povis vivi senpolitike kaj partopreni en la profitado de la ekonomia prospero. La reĝimo uzis nur tiom da mensogoj kaj subprema perforto kiom ili estis necesaj por forteni la loĝantaron de la politiko – ne pli. Tio kreis tabuan

[18] Vd. https://www.ukrinform.de.
[19] Vd. https://www.nzz.ch/meinung/ukraine-sich-um-putins-gesichtswahrung-zu-sorgen-ist-verrueckt-ld.1688632.
[20] Vd. https://neofelis-verlag.de/anna-schor-tschudnowskaja.

bufrozonon inter la popolo kaj la ŝtatelito aŭ ŝtatburokratio. Subfosado kaj manipulado – kaj nature mensogado – estis la ĉefaj kaj tipaj rimedoj, per kiuj la iom sovaĝa KGB-servisto Putin kaj ties eĉ pli obskura bando de bigotaj postkomunismaj politikaj kaj ekonomiaj profituloj[21] regis la landon ekde la komenco, estante netuŝeblaj (iliaj nomoj estas tre malofte aŭ eble eĉ neniam uzataj en la rusaj amaskomunikiloj, do iusence tabuitaj). Tiel okazis, ke en Ruslando estis plantita nova speco de nihilisma aŭtokrateco, kiu prosperas pro sensenceco kaj absurdeco anstataŭ kun la perspektivo de pli bona estonteco.[22]

Kaj tiel la „Imperio de la malbono“ restis ankaŭ la „Imperio de la mensogoj“, kiu ĝi estis dum jarcentoj. Por la Okcidento, kiun ĝi kontraŭbatalas, celas trompi per politikaj propagandaj mensogoj kaj volas detrui, Ruslando restis altgrade danĝera. La homoj en Okcidento devas finfinfe konscii pri tiu vero. Verŝajne nur per grandskala rearmado la Okcidento povas bridi la rusan danĝeron kaj finfine la rusajn mensogojn mem, kiuj minacas la tutan mondpacon.

Iu rusa esperantisto, kiu verve defendas la politikon de la Kremlo, reagis al ĉi tiu eseo, skribante: „Mi ne volas legi propagandajn artikolojn. Vi en tiu ĉi artikolo ripetas nur kliŝajn okcidentajn propagandajn artikolojn. En tiu artikolo ne aperas iuj novaj kaj interesaj faktoj aŭ pensoj.“ Ŝajnas, ke tiu ruso celis mesaĝi, ke ĉi tie temas pri nenio alia ol pri (propagandaj) mensogoj de la alia flanko ?

En sia aŭtobiografia memuaro “Patrioto”, en kiu Aleksej Navalnyj sennombrajn fojojn menciis la problemon de la mensogado en Ruslando, diris en sia fina pledo okaze de la Yves-Rocher-proceso la 20an de februaro 2021, kiu estis dediĉita al ĉi tiu problemo de la mensogado: „ … Pensu mem, kiel bona estus la vivo sen konstanta mensogado, sen tiu mensogo.” „ … Nature, ĉiuj fartus multe pli bone, se tiu mensogado kaj maljusteco ne estus.” – ruslingve: „Подумайте сами, как хороша была бы жизнь без постоянного вранья, без этой лжи. …” „ … Конечно, всем было бы гораздо лучше, если бы этого вранья и несправедливости не было. …“[23]

© (Esperanto) www.planlingvoj.ch A. Künzli (Svislando), junio 2022, julio/sept. 2023/dec. 2024

[21] Nu legu la libron de Miĥail Zygar pri la plej proksima amikaro de Putin.
[22] Laŭ https://www.nzz.ch/meinung/russland-tiefe-leere-putins-autoritarismus-ist-ein-nihilismus-ld.1676539
[23] Laŭ https://meduza.io/feature/2021/02/20/rossiya-dolzhna-byt-ne-tolko-svobodnoy-no-i-schastlivoy